Martinus

La Tria Testamento

La intelektigita kristaneco



Enkonduko
La cioamo kiel scienco

De kredo al scio

La celo de La Tria Testamento estas levi la grandajn demandojn de la vivo el la nebulo de la kredo, al propra spertado kaj certa scio. Estas la baza tezo de la verko, ke la mistero de la vivo estas science klarigebla.

La spirita scienco priskribas la pensomondon

Sed ĉi tie la enigmo de la vivo ne estas klarigata tradicie naturscience. Estas la konscio, kiu nevideble kondukas ĉion, kio antaŭ ĉio analizatas. La pensomondo okupas multe pli gravan rolon, ol ni kutime imagas.

Esplora vojaĝo en la interno

La studo de La Tria Testamento invitas al miriga esplorvojaĝo en nia interna mondo. Ni gvidatas per pensovicoj el la ŝanĝiĝanta mondo de la materio, ĝis la plej interna fonto de la vivo. Ĉi tie estas malkovrite, ke ni ĉiuj estas senmortaj, ke nia plej interna naturo estas eterna kaj senfina. Ni konstatas ke la kerno de la vivo estas la sama en ni ĉiuj. Ni konstatas ke ĉio ĉirkaŭ ni estas vivanta, ”malsupre” en mikro-same kiel ”supre” en makrokosmo.

Antaŭ niaj mirantaj okuloj la universo transformiĝas de aro da mortaj materioj kontrolata de hazardo, al esti perceptata kiel ĉioamplekse vivanta, pensanta organismo, kiu ekzistas eterne. Ni konstatas, ke ni ĉiuj eterne vivas, moviĝas kaj estas en tiu ĉi organismo. Ni konscias la amoleĝojn, kiuj garantias ĉi tiun eternan vivon de tiu vivanta, konscia organismo. Ni komencas povi vidi nian mallongan tergloban vivon laŭ la perpekstivo de la eterno.

La eterna vivdemando

La titolo: ”La Tria Testamento” evidente kaŭzas miron. De kiuj du aliaj testamentoj La Tria Testamento estas la daŭrigo? Kiam ni komprenas tion, ni tuj ekvidas pri kio temas. Daŭrigo de la Malnova kaj la Nova Testamento kompreneble devas temi pri la eternaj demandoj: ”Kiu mi estas?”, ”De kie mi venis?” kaj ”Kien mi iras?”. Devas esti vera klarigo de la problemo de suferoj, kaj tiel, fina klarigo de la vojo al la feliĉo.

– Sed kiu povas prave havi la taskon verki daŭrigon de la Biblio? Ja tiu povas kompreneble esti nur homo kiu kiel Kristo havas propran scion pri la eternaj demandoj.

“Livets Bog“ (La libro de la vivo)

La ĉefverko de La Tria Testamento nomiĝas ”Livets Bog” (la libro de la vivo). La mondotuto komparatas kun libro. La mondotuto estas ”la libro de la libroj”, la fonto de ĉiu scio. Ĉiuj legas ĝin. Kristanoj kiel islamanoj, judoj kiel budhanoj, kiel ankaŭ sciencistoj, verkistoj kiel artistoj. Kaj ni ne forgesu la plantojn kaj la bestojn, jes ja, ĉiu ni konservas nian vivon je reciproka influo kun ĉiuj fortoj, kiuj ĉirkaŭas nin.

La Tria Testamento “Livets Bog” instruas al ni kiel rekte legi la libron de la realo - la naturo. En ĝi ni ĉiuj estas denaskaj membroj. Ĉi tie postulas neniun membrigan ceremonion. La Tria Testamento kreas neniun novan religion, sed kontraŭe instruas al ni kompreni la propran religion de la vivo.

La celado de la verko estas montri kiel la amo al nia proksimulo kaj al Dio, estas la plej alta scienco de la vivo. Dio estu komprenata kiel ĉioampleksa vivanta estulo, analoga al la mondotuto. La demandoj pri ”la eterno” estas ĉi tie detale analizataj en la klara lumo de la intuicio. Ĉar la homaro pli kaj pli lasas la kredostadion, ĝi postulas kontroleblajn faktojn – ankaŭ rilate al la grandaj spiritaj problemoj de la vivo.

La Tria Testamento estas la plenumiĝo de la krista profetaĵo

Ke tiu ĉi scio venos al la homaro, estas antaŭdirite. En La Nova Testamento ni povas legi: ”Ĉi tion mi diris al vi, kiam mi ankoraŭ estis ĉe vi. Sed la Parakleto, la sankta spirito, kiun La Patro sendos en mia nomo; li instruos al vi ĉion, kaj memorigos vin pri ĉio kion mi diris al vi”(Joh. 14: 25-26) ”...kaj mi petos al La Patro, kaj li donos al vi alian Parakleton kiu por ĉiam estos ĉe vi, la spirito de la vero, kiun la mondo ne povas ricevi, ĉar ĝi ne vidas lin kaj ne konas lin.”. (Joh. 14: 16-17)

La kondiĉo por povi sperti spiritajn realaĵojn

Por akiri scion je la spirita kampo ne sufiĉas evoluinta inteligento aŭ analizkapablo. Postulatas ankaŭ humana karaktero. Nur per la intelekta kaj humana maturiĝo ekestas la psika ŝanĝiĝo, kiu ebligas, ke ni povu sperti spiritajn realaĵojn. Estas jena mentala ekvilibro, kiu donis al Martinus, la verkinto de La Tria Testamento, absolute certan scion pri la kutime tute nekonataj kampoj de la vivo.

Inspirostato kiu plivastigas la konscion

Tiu ĉi ekvilibrigita mentala stato estas ĉe ĉiuj evoluanta. Dum helaj kaj harmoniaj momentoj stato de inspiro povas aperi ĉe verkistoj, sciencistoj, muzikistoj aŭ komponistoj k.a. Novaj ideoj tiam fluas en la konscion. Ĝi pleniĝas je preta pensmaterialo por plenaj literaturaj verkoj, muzikkomponaĵoj aŭ sciencaj eltrovaĵoj.

Povas okazi, tute neatendite por la humana homo, ke ĝi povas travivi lumbrilan scion pri la spirita realo kaj la eternaj realaĵoj. Subite oni havas la solvon de spirita problemo aŭ spertas la Dion. Travivaĵoj tiaj ja havas grandegajn efikojn kaj motivigojn. Estas tiu ĉi stato de inspiro, kun kiu la estintaj saĝuloj, ekz. Moseo, Jesuo, Budho aŭ Mohamedo konscie kontaktiĝis, kaj kiu estas la bazo de iliaj senmortaj vortoj kaj diraĵoj. Sama inspirofonto estas bazo de la spirita scienco, kiun ni povas studi en La Tria Testamento.

Kosma konscio aŭ ”La sankta spirito”

Ni do ĉiuj survojas al la fina celo: ”kosma konscio”. Per ekbrilaj intuiciaj travivaĵoj malfermiĝos iom post iom tute senlima horizonto de konscio. Estas tiu stato kiu, en bibliaj rilatoj, priskribatas kiel ”la sankta spirito”. ”Sankta” estas analoga vorto al ”vera”. ”Spirito” signifas ”pensoj kaj imagoj”. ”Sankta spirito” simple signifas ”veraj pensoj kaj ideoj pri la plej supra”: La klarigo pri la mistero de la vivo, aŭ alivorte: La kompreno pri nia rilato al Dio kaj nia proksimulo.

Ĉu vere La Tria Testamento enhavas tiajn pensojn? Nu, la respondo al jena demando kompreneble estu laŭ decido de la studanto mem.

www.tria-testamento.info

Eldonanto: info@tredjetestamentet.se

TT Flyer • 04-2026-HU